

## **Intervjuo de Maram-al- Masri**

**de Fulvio Caccia**

**kadre de [televida elsendo](#)**

**de « L'observatoire de la diversité culturelle »**

**dissendita de la TV stacio « TVM Est Parisien »**

### **Esperantigis Michel Fontaine**

(Fulvio Caccia)

La Observejo de la Kultura Diverseco proponas al vi ĉi elsendon pri Kultura Diverseco kaj pri tiuj, kiuj ĝin zorgas. Kial la diverseco? Ĉar, malgraŭ la paroloj kaj la diversaj organizaĵoj, kaj la interkonsento de UNESKO, la Kultura Diverseco restas malforta kampo de niaj modernaj socioj. Diverseco signifas plurecon. La plureco esprimiĝas multe en poezio, kiu esploras personajn teritoriojn, funde de nia libero kaj volo kune vivi. La araba poezio skribita en Francio ilustras tion, kaj aparte la poezio de Maram el Masri.

FC : saluton, Maram. Vi naskiĝis en Lattaquié en Sirio. Lattaquié ne estas hazarda loko por vi kiel poetino.

M : Jes ja ! Ĝi estas antikva urbo, kies nomo estis Laouadissa. Ĉi lasta estis fratino de « Eskandhar le Grand. » Li konstruigis la urbon kaj donis al ĝi la nomon de sia fratino. Grade la nomo ŝanĝiĝis en Lattaquié. Fama poeto Al Moutanabbi parolis pri tiu urbo, kaj pri la religia batalo, kiu disvolviĝis ene de ĝi. En tiu urbo oni trovis la unuan « eugaritique » alfabeton , kiu naskis la unuajn arabajn skribaĵojn.

FC : nu ! ne estas koincido... ! Kiel estis vivi en Sirio por la tiama junulino ?

M : Mi pasigis infanecon en tiu urbo, kaj poste mi foriris al Damaso por studi. Lattaquié estas marborda urbo, burĝa, kvieta...Mi ĝuis liberecon, kiu ne estis donita al aliaj junulinoj, des pli ke mia familio estis laika, liberanima. Mia patrino estis lernejestrino. Mi havis pli aĝan fraton, kiu estis ankaŭ poeto. Li instruis al mi poezion, kolorojn, pentrarton, dancon, la tutan liberecon, kiun mi ĝuas nun en mia menso, danke al li kaj aliaj personoj, kiuj puŝis min legi lin. Se mi ne havus fraton kleran, kiu amas teatraĵon, poezion, mi estus « ordinara » virino – tio jam estus tre bona- sed li donis al mi tiun viruson ami esplori, legi, fuĝi el mia homa kondiĉo al arto kaj literaturo.

FC : li mem, via frato, eldonis vian unuan libreton – vi ignoris tiun fakton - « Mi vin minacas per blanka kolombo ». Kio estis tiu libro ? leteroj al via amato ?

M : ekzakte ! Tio estas aro de amleteroj al mia amato, kiu estis kristano. Por musulmanoj, tio estis revolucia fakto. Mi pensis, ke tio estis mia unua revolucio, kaj mia defendo, ke ĉiuj homoj rajtas ami

kaj pensi laŭvole, eĉ ŝanĝi siajn mensojn. Poste mi migris al Francio, - kun la intenco iam reveni - kaj mia frato, dum mi malĉeestis, kolektis miajn poemojn en miaj tirkesto kaj eldonis ilin en diversaj ĵurnaloj..

FC : kion pri tia titolo ?

M : tiu titolo estis verkita de iu alia poeto, kies poemo aperis en la sama libro. Ĉiu poeto havis sian propran titolon. La mia estis « Loĝantino sur la tero ». Tri poetoj kontribuis al la libreto.

FC : vi studas arton kaj anglan literaturon en Damaso. Parolu al mi pri tiu urbo antaŭ via migro al Parizo.

M : Jes, mi havis ŝancon aparteni al tiu familio, kiu lasis min foriri. Malfacile estis por musulmana virino lasi la hejmon, malproksime de sia familio. Neniam virino dormas ekstere de sia hejmo. Bonŝance la familio donis al mi tian oportunecon. Mi memoras, ke mi dum iom da tempo hezitis inter belartoj, kaj angla literaturo. Finfine elektis la duan, ĉar tiel mi ja estis pli proksima de mia koramiko...En tiu momento, dekokaĝaj, amo estis centre de nia vivo...Oni konstruas ĉion ĉirkaŭ tio, kies nomo estas amo...

FC : kial vi forlasis Damason ?

M: mi forlasis ĉar mi edziniĝis al studento pri literaturo en la Sorbonne, kun la intenco reveni post du jaroj.Li originis el Lattaquié, kiel mi. Sed poste, ni divorcis, kaj mi restis en Francio.

FC : malfacila momento por vi...

M: jes, oni forŝiris de mi filon dek ok monatojn aĝan . Mi estis en Francio, kaj mia eks-edzo, kvazaŭ punis min. Tian punon viroj ofte aplikas al siaj edzinoj, kiuj decidis foriri. Mi restis 13 jarojn sen ebleco revidi mian filon.

FC : tio klarigas vian tiaman silenton...

M : jes, dolora kaj penplena silento...Tiam mi pensis, ke oni metis kapkusenon sur la buŝon de mia animo. Mi pensis ankaŭ, ke la sukceso de mia unua verko « Mi vin minacas per blanka kolombo ». timigis min. La amo malaperis, kiu inspiris al mi la imagkapablon. Mi volis verki ion malpli intima kaj revolucia. Adopti alian civilizacion, alian kulturon igis min malproksimiĝi de mia fonto. Tiam mi letis kvazaŭ kurtenon por kaŝi la pasintecon.

FC : tamen vi estas ribelino...

M : sed mi estis fragila, en Francio, malproksime de mia patrio, perdinte infanon, akceptite de franca familio, kiun mi amis. Kaj mi pensis, ke mi iamaniere meritis la punon. Mi provis doni la plej bonon de mi, min oferi por aparteni al aliaj, al nova civilizacio. Pro mia tristeco, mi rifuzis la sirian parton de mi. Mi tiel esprimis la koleregon perdi infanon. Mi ne plu volis esti siria. Mi volis turni la dorson de Sirio kaj de poezio. La poezio estas lingvo kaj lingvo estas konscienco, animo, kulturo de popolo. Rifuzinte la lingvon, mi rifuzis ankaŭ ĉion, kio akompanas ĝin.

FC : en iu ĵusa libro, vi esprimis iun virinan temon.

M : tiu libro estas cenzurita en Sirio.

FC : ĉu !

M : mi ne scias la kialon. Ĉiam estas ia kialo...

FC : ni revenos poste al tiu temo.

M : Kiun poemon vi dezirus, ke mi legus ? La unuan ? La ideo venis al mi, kiam mi vidis iun virinon foriri en la samaj kondiĉoj kiel mi : t.e. feliĉa, bonsana, infano en tre bela ĉareto, mi demandis min ĉu tiu virino povus esti perfortita, ĉu ŝi vivas terurajn vesperojn. Atiginte la domon de « Ĉesigu la violentojn al virinoj » ankaŭ tiu virino frapis ĉe la pordo. Mi pensis pri tiaj virinoj, ignoritaj, kiuj suferas pro violentoj, kaj kiuj ne havas forton kaj parolojn por riveli. Tiam mi sentis mision de poetino por paroli en ilia loko.

(ŝi legas en la araba, kaj poste la ĵurnalisto legas en la franca)

FC : ***(Michel Fontaine esperantigis la poemon)***

**Iŝi**

**Mi vidis iŝin kun kaŝitaj bluaj ekimozoj**

**Sur la vizaĝo**

**Iŝiajn vundojn inter gamboj**

**Iŝian rideton lacan**

**Iŝian kaptitan revon**

**Iŝiajn mutajn vortojn**

**Mi vidis ĉiujn preterpasi surstrate,**

**Kiel animoj nudpiedaj,**

**Retroen rigardante,**

**Time, ke iŝi estus sekvitaj de la tempestaj piedoj,**

**Ŝtelistinoj de luno,**

**Iŝi preterpaŝas kun masko de ordinaraj virinoj.**

**Neniu kapablas rekoni iŝin**

**Krom tiuj, kiuj similas.**

*(la tradukisto Michel Fontaine,*

*li tute preferis uzi la neologismojn “iŝi”, “iŝia”, “iŝiaj”,*

*kiu pli bone kongruas kun la temo kaj la stilo de Maram)*

M : dankon !

FC : La virinan kondiĉon vi vivantas ĉi tie, sed ĉi tie estas liberaj virinoj, ekz la movadoj de liberigo de virinoj. Kiel vi adaptiĝis en Francio ?

M : Mi estas duobla : siria kaj franca. Ambaŭ kulturoj aldoniĝas. Kelkfoje tio estas laciga. Necesas granda peno por fariĝi civitanino. La suko de la poezio esploras, elfontas el ĉi duobleco, komplikeco, diverseco. Mi estas plurvizaĝa. Mia libro « Mi rigardas vin » parolas pri tiu temo. Mi estas, franca, mi estas siria, sed plie mi estas plurala, surtere loĝantino.

FC : fakte tiu libro, spegule verkita « Mi rigardas vin » eldoniĝis en Libano, kaj ricevis poezian premion de Beletra Socio. En ĝi aperas du virinoj : poetino kaj ĉiesulino, kiuj interparolas kaj interrigardas.

« Ĉiam estas iu, kiu similas al ni, diras la ĉiesulino kun fido, rigardante tra la fenestro, kvazaŭ ŝi observis sian revon, arbon ŝarĝitan de fruktoj ».

En tiu verko, vi movas limojn inter viro kaj virino. Vi kaptas la viran parton ene de vi, kaj vi substrekas ĝin belmaniere. Ŝi diras : « Jes, mi avide manĝis lin, mi estis malsata kiel viro, mia deziro renverŝis lin, ornamite de lia vireco. » Tre bela, sed ankaŭ tre ekscita. Oni cenzuris vin en via lando. Ĉu vi konscias ke ankaŭ tia virineca deziro povas eksciti viajn legantojn ? Kiel vi vivas tian voluptemon kaj tian vian virseksecon ?

M : mi opinias, ke homoj devas ĉesigi sian hipokritecon, kaj toleri sian plurecon. Ni estas viroj, virinoj, animaloj, vento, maro...ĉio en ununura persono. Tion mi ĉiam volis mesaĝi. Neniam restu en antaŭjuĝoj. Tiu ĉiesulino, pri kiu mi parolis, estas ankaŭ ordinara virino, kaj patrino, kiu ordinare ĉiutage vivas, aĉetas sian panon, vivas tristajn vesperojn, ŝi estas forlasita, revas, deziras. Mi volus montri, ke nenio 100% puras, kaj nenio 100% nigras.

FC : Tamen ni vivas en socio, inkluzive en Francio, kiu fermiĝas en si mem, kategoriĝas. Oni feliĉe aŭskultas vian mesaĝon, sed ĉu vi ne timas esti ŝtonumita ? (ŝi ridas) Mi tion ne dirintus antaŭ 10 jaroj, sed hodiaŭ...

M : verki poeziojn estas ĉiutaga risko, publikigi poemojn estas ĉiutaga risko, precipe por virino, ie ajn en la mondo. Mia libro estis tradukita en Anglio, kaj artikolo aperis en la gazeto « Times » : sxtiparo de tabuoj. Tamen, mi ne povas diri, ke mi senkulpas pri tiu deziro nudiĝi, montri sekretan vizaĝon de homoj, sed mi tion faras kun grandaj sincereco kaj volo. Kio estas literaturo, se oni ne montras niajn vundaĵojn, nian internon ? Ĉiuj literaturoj nin skulptas, nin plibeligas, kaj montras al ni kiel vivi kun aliaj.

FC ! jes, vivi kun aliaj...En « la reveno de Ualada » (2010) » vi plimalproksimen iras en tia serĉado, note tra la persono de andaluzia princino (XI<sup>o</sup> jarcento), en la lando de araba dinastio de la « Omeyyades », vi konstruas geografion de antikva eŭropo, miksante eŭropajn kaj arabajn pejzaĝojn...

M : jes, tiam mi estis invitita de Hispana Universitato. Oni petis de mi verki poemojn, kun fotoj de mi en la Palaco Amal'Ra. Tiam mi havis veran senton reveni en « miajn » lokojn. Mi, kiel Siriano, filino de Damaso, mi rolis kiel Ualada, kaj mi diris al mi : jen tiu virino revenas, kaj kion ŝi vidas ? Mi parolis pere de ŝia lango. Forta emocio por mi ! Ĉar momente mi forgesis min mem, kaj pensis, ke

mi estas ŝi. Mi partigis ŝian animon, faman pro ŝiaj liberanimo, aŭdaco, kaj beleco. Mi esploris ŝian historion, kaj provis re-ligi okcidentanojn kun araba granda kaj delikata civilizacio, Fakte multe da eventoj, militoj, rompis la ligojn (atencoj la 11an de septembro, Palestinio, Irako, Sirio), kaj Eŭropo malbone taksas arabojn. Ili devas rekonsideri sian rigardon al ni.

FC : ni parolu pri via stilo ne komparebla, nervoza, preciza, kun mallongaj verŝoj. Vi estas kiel kontraŭ

« Shéhérazade »

M : (ridante) mi laboras per kruda, primitiva materialo. Ofte mi asertas, ke mi poezias pri vivantaj spertoj, tute ne pri lingvo...Tamen mi uzas la lingvon. Mi ĉiam kredas, ke ĉiuj homaj produktaĵoj – inkluzive de poezio – estas tre ligitaj al ni mem, kiel okuloj, haroj, nia personeco, nia historio, kulturo...Niaj produktaĵoj similas al ni mem. Mia interna serĉo apartenas nur al mi. Ĉiuj libroj, kiujn mi legis, restis en mi, eĉ senkonscie. Mia stilo ligiĝas al ĉiuj koloroj vidataj de mi, al ĉiuj movoj kaptitaj de mi. Mia lasta libro, kiu baldaŭ (en marto 2016) eldoniĝos ĉe la editoro Bruno Doucey ... « Pere de la fonto de mia buŝo », temas pri mia stilo.

pere de la retejo de la « Editions Bruno Doucey »

kiu publikigas la en la franca tradukitaj librojn de Maram,

[alia intervjuo de Maram](#), ĉe « Canal Académie »,

la radio de la Franca Akademio.

ankaŭ estas aŭdebla intervjuo de Maram, en la Franca